Stonehenge

Stonehenge estas neolitika monumento apud Amesbury en la provinco de Wiltshire en Anglio. Laŭ arĥeologiaj esploroj unua ŝtoncirklo estis konstruita ĉirkaŭ 3100 a.K., kaj la tuto estis rekonstruita kaj pligrandigita verŝajne inter 2500 a.K. kaj 2000 a.K. kaj parte rekonstruita dum la 19-a jarcento.

La katedrala urbo Salisbury estas 13 kilometrojn (8 mejlojn) for, kaj en la vojo estas la ruino de mezepoka urbo Old Sarum.

Stonehenge estas granda rondforma grupo (kromleĥo) de 162 starantaj ŝtonegoj t.e. megalitoj. Ĝi ankoraŭ estas sanktejo por modernaj druidoj kaj aliaj paganoj, sed la zorgorganizaĵo *English Heritage* malpermesas alproksimiĝi al la ŝtonoj, precipe dum somera solstico.

Piedireble ĉirkaŭ Stonehenge estas altaĵetoj, verŝajne neolitikaj tomboj, kaj neolitika ŝtona "ŝoseo".

Dum 1986 Stonehenge estis deklarita de UNESKO loko de Monda Kulturheredaĵo.

Proksima ŝtonrondo en Wiltshire estas Avebury, kie vilaĝo kreskis meze de la rondo.

Kelkaj markoj montras, kie suno aperas kaj malaperas en specialaj tagoj kiel solsticoj. Oni supozas, ke konstruintoj de Stonehenge uzis ĝin kiel kalendara ilo.

Tamen lastatempaj esploroj helpitaj de National Geographic montris, ke la ĉefa funkcio de la monumento estis tombejo aŭ sepultejo. Tiu sepulteja funkcio daŭris dum multaj jaroj de funkciado de la monumento, laŭ Mike Parker Pearson, arkeologo de la Universitato de Sheffield. Iam antaŭe oni konis la ekziston de putoj enhavantaj ostojn kaj cindrojn, ĉar kutimis kremacio. Tiuj esploroj baze sur analizoj de radiokarbono pruvis, ke la loko jam estis uzata por sepultejo 5 000 jarojn antaŭ nia erao kaj ĝis multe post la starigo de la megalitoj. Oni enterigis tie almenaŭ dum kvin jarcentoj (3000-2500 a.K.) 240 personojn, multe pli ol tio antaŭe supozita. Tiuj personoj estus tribestroj kaj samfamilianoj de tiuj, ĉar kun ties restaĵoj estis armiloj.

Ankaŭ laŭ tiuj esploroj la ekzisto de Stonehenge estas ligata al tiu de la najbara arkeologa vilaĝo nome Durrington, kie estus loĝintaj la konstruintoj de Stonehenge. La rilatoj estas evidentaj: ambaŭ lokoj estas proksimaj, prezentas similan rondoforman protektitan strukturon kaj en Durrington oni trovis ellignan strukturon similan al tiu de Stonehenge kaj en ambaŭ lokoj vojo kunigas la lokon kun la rivero Avon. Per tiu vojo ambaŭ lokoj estus en kontakto. En Stonehenge oni enterigus la elitanojn kaj la normalajn samvilaĝanojn oni estus lanĉintaj al la rivero.

Retpaĝo: www.traduki.de
Teksto: eo.wikipedia.org/wiki/Stonehenge